

& Ho ve, koro:

< Rekante 23 el 41 batoj por strofo, entute 369 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof poemojn "Ho ve, koro disŝirita" (Per espero al despero, Pardubice 1910) kun dediĉo "Al mia karega familio" kaj "La frateco" (Bohemaj grenatoj) al Svatopluk Čech. Baladigis Martin Strid (2016) per kunmeto na ili kaj novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (

/dodo SoSo doTi re do; mimi rere fami so fa; soso sofa mire mido; domi redo fami so fa; soso sofa mire mido;

(#Rekantaĵe: doododo TiTi redo So do; mimi re fami do mi; soso sofa mire mido So TiTi re do)

)×9)+

(&Strofoj:

,& Ho ve, koro disŝirita:

'1 (×: **Ho ve, koro disŝirita!** ;)

Duon' batas por la mondo, ; tuta mondo kaj senlima, ; duon' por la propra rondo; malplej granda, plej proksima.

(×:; **Kia doloro, mia koro! ; Tenu nun ĉenon kune ; kaj atente paŝu ĉiu laŭ sia paŝo.**)

'2 Duon' batas por idaro, ; mia propra sang' kaj varmo, ; duon' batas por homaro ; kaj senĉesa ĝia larmo.

'3 Duon' batas por fragmento, ; propra lingvo, propra domo, ; sed duon' por ĉiu gento, ; de Tokio, ĝis al Romo.

,& Frateco:

'4 Ni forĵetis la pokalon ; plenan de la gal' kaj pest', ; sur la tero jam eksonu ; de l' frateco sankta fest'.

'5 Nur neniu volu havi ; ĉiujn laŭ la sama form', ; dum la vivo sane bolas, ; ne ekzistas unu norm'.

'6 Se nur nia koro batos ; por la sama cel' kaj ag', ; tiam certe nin renkontos ; foje ni sub unu flag'.

'7 Nur prudento kaj nur sento ; estu nia armilar', ; la envi' kaj malfavoro ; apartenas al barbar'.

'8 Kiu volas, ke ekĝermu ; en la mond' de l' paco sem', ; li purigu propran koron, ; estu tolerema mem.

'9 Li forĵetu la pokalon ; plenan de la gal' kaj pest', ; kaj sur tero laŭte sonos ; de l' frateco nobla fest'.)